

## Svislando en la internacia vivo

Claude Gacond, 79-a radioprelego, 1964.06.03 & 06

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtonda Radiostacio pri Svislando en la internacia vivo. Vi aŭdas Claude Gacond.

Multfoje eksterlandanoj esprimis al mi sian miron konstati, ke Svislando ne apartenas al Unuiĝintaj Nacioj, kvankam ĝi membris en Ligo de Nacioj.

Ni provu hodiaŭ klarigi kial nia lando, kiu aliĝis al preskaŭ ĉiuj internaciaj organizaĵoj, ne ankoraŭ petis al Unuiĝintaj Nacioj ĝin ricevi.

Post la unua mondmilito Ĝenevo, kiu estis la urbo de Ruĝa Kruco, senhezite estis elektita kiel sidloko por Ligo de Nacioj. Oni tiam deziris starigi tiun organizaĵon en neŭtrala lando kaj vidis en la ĝeneva spirito simbolan promeson por la sukceso de Ligo de Nacioj.

Post la dua mondmilito, kiam oni serĉis urbon dignan por ricevi la sidlokon por la nova Ligo de Nacioj, tio estas por Unuiĝintaj Nacioj, tiam la okuloj ne plu tiel unuanime turniĝis al Ĝenevo. Oni serĉis alian, kaj seeble pli grandan urbon. Vi scias, ke fine oni elektis Nov-Jorkon kiel sidlokon por Unuiĝintaj Nacioj, tio verŝajne pro la morala kaj financa apogoj de Usono.

En Svislando la popolo devas voĉdoni pri ĉiu ŝanĝo de la Konstitucio. La eniro de Svislando en Ligon de Nacioj signifis ŝanĝon de la svisa konstitucio, do la svisa popolo en 1920 devis doni sian vidpunkton tiurilate. Ĝi voĉdonis jes. Tiam entuziasma kunirantaro promenis en la stratoj de Ĝenevo esprimanta grandan esperon. Sur la muroj afiŝo montris kampanon, kiu el sia glavo fabrikis plugilon. Oni esperis, ke dank'al la ekzisto de Ligo de Nacioj perforto kaj konsekvence militoj malaperos el la internacia vivo.

Verŝajne la svisa popolo metis tro grandan esperon en Ligo de Nacioj. Kaj ĉar la sidloko de tiu organizaĵo troviĝis en Svislando mem, la svisa popolo tro detale interesiĝis al ĝia vivo. Antaŭ la malrapidemo de la debatoj, antaŭ la malbonvolo de iuj ŝtataj reprezentantoj, la ĝeneva kaj svisa publiko rapide seniluziiĝis. Ĝia entuziasmo fariĝis skeptikemo kaj mokemo. La svisa popolo juĝis la debatojn de Ligo de Nacioj kun la samaj kriterioj, kiel por la debatoj en la Svisa Federala Parlamento aŭ eĉ kiel por la kantonaj aŭ komunumaj debatoj. Ĝi estis por aŭ kontraŭ. Ĝi rigardis al sia monujo, kiam grandaj sumoj estis elspezitaj por aferoj, kiujn oni ne komprenis. Kvankam tiu mono ne estis la propra, oni malfacile povis akcepti, ke tiom grandaj sumoj estis elspezitaj dum popolanoj mem penige pergajnis, aŭ eĉ ne pergajnis sian vivon. Ni ne forgesu, ke inter 1930 kaj 1935 okazis senprecedenca ekonomia krizo.

En Ĝenevo oni enviis la salajrojn de la oficistoj de Ligo de Nacioj. Vidante, ke en la nova blanka palaco de Ligo de Nacioj la ambasadoroj pli ofte defendis proprajn apartajn ŝovinismojn kontraŭ la ĝenerala bono, oni komencis malfidi al ĉiuj diplomatoj.

Kiam la palaco komencis malpleniĝi, tiu publiko, kiu havis la tempon absolute seniluziiĝi, konkludis, ke neniam plu ĝi permesos al sia lando eniri similan Ligon de Nacioj. Ĝi ankaŭ havis en la memoro la svisan historion. Necesis ses jarcentoj, por ke la interkantonaj konfliktoj ĉesu, tio post la fondiĝo en 1848 de vera federacia registaro. Ĝis tiam la kantonoj nur sendis ambasadorojn al speco de Ligo de Kantonoj, kaj en tiu Ligo aŭ Dieto oni nur akordiĝis okaze de terura komuna danĝero. Fari paralelan komparadon inter la malnova eterne disputplena Ligo de Kantonoj kaj la ankaŭ disputplena Ligo de Nacioj estis facile.

En 1945, kiam en San Francisko reformiĝis nova Ligo de Nacioj, la svisa popolo malafable ridaĉis. Ĵurnalistoj provis defendi Unuiĝintajn Naciojn, sed la publiko restis surda. Ĝi volonte akceptis kunlaboron kun fakaj mondaj organizaĵoj, ĉar ĝi havis antaŭ la okuloj la utilan Internacian Labor-Organizaĵon. Do vi povas pensi, ke la svisa registaro ne kuraĝis proponi al sia popolo voĉdonon pri la eniro de Svislando en Unuiĝintajn Naciojn. Ĝi antaŭsciis, ke la respondo estus estinta Ne.

## Svislando en la internacia vivo

Claude Gacond, 79-a radioprelego, 1964.06.03 & 06

Nun kaj tio ĉefe en la franca parto de la lando, kie troviĝas Ĝenevo, oni komencas pensi, ke Svislando devus repensi sian juĝon. Unuiĝintaj Nacioj festos baldaŭ sian dudekan jaron. Ili verŝajne malebligis multajn konfliktojn. Tamen en Svislando oni estas iom senpacienca antaŭ iuj sintenoj de la organizaĵo. Oni ekzemple ne komprenas, kial la ĉina popolo, kiu nombras preskaŭ la kvaronon de la homaro, ne rajtas eniri la mond-organizaĵon. Tio ne signifas, ke oni simpatias kun la politiko de tiu lando, sed ke oni pensas, ke neniam Unuiĝintaj Nacioj kapablos fariĝi vera mondregistaro, se ili elektas siajn membrojn laŭ ties politikaj vidpunktoj.

Vi aŭdis Radio-Svislandon. Claude Gacond parolis pri Svislando en la internacia vivo.

Ĝis reaŭdo !

-oOo-